

Kiel atingi de 'Flughaveno Gimhae(Busan)' al ILEI

Tiu ĉi informilo estas por vi,kiu alvenos la urbon Busan per aviadilo.

[Notoj]

Gimhae estas nomo de la najbara regiono de Busan.

La flughaveno Gimhae situas en urbo Busan.

Antaŭe la loko de la flughaveno apartenis al urbo Gimhae, tial ĝi ankoraŭ uzas la nomon 'Flughaveno Gimhae'.

Se vi trovas vin en la flughaveno Gimhae, vi bone alvenis la urbon Busan.

En Koreio, oni nomas ter-etaĝon '1-a etaĝo', malsame ol en kelkaj landoj.

KRW aŭ ₩ signifas korean mon-unuon "Korea Ŭono".

En tiu ĉi informilo, vi trovos

Kie estas metroo-stacio, en la flughaveno

Kiel atingi per metroo al ILEI-kongresejo

Kiel aĉeti bileton por Metroo

Kiel proksima estas de la metroo-stacio BEXCO la kongresejo ?

Kie estas Limuzina buso kaj Taksio, en la flughaveno Gimhae

Bus-haltejoj de la Limuzina buso, ekde la flughaveno ĝis la kongresejo

Arpina kaj ĝia najbaro

Taksio, de la flughaveno al la kongresejo

* Mi rekomendas al vi elekti la limuzinan buson.

Kie estas metroo-stacio, en la flughaveno

Flughaveno Gimhae havas 2 terminalojn, kiuj proksimas unu de la alia. Elvenante de kiu ajn terminalo, oni povas trovi Metroo-stacion, kiu staras meze de la aŭtoparkejoj, kaj kiun vi povas facile atingi per piediro.

La metroo tie estas mallonga, malpeza tipo, kiu konsistas el nur 2 vagonoj.



Ne estas rekta linio de la flughaveno al la ILEI-Kongresejo. Oni bezonas transvagoniĝi almenaŭ unu fojon. Ni malkonsilas al vi la uzon de metroo.

Kiel aĉeti biletan por Metroo

Oni povas aĉeti biletan ĉe aŭtomato (bilet-maŝino).

La bilet-aŭtomato en **flughaveno** estas purpura.

Se vi aĉetas de ĝi unufojan biletan, fakte ĝi aspektas kiel ronda butono.



En Busan-Metroo (ekz. Linio #2. Verda al ILEI-kongreso)

Oni uzas tute alispecan biletan, se vi ne havas trafik-karton.



Ĉar estas vere ĝene aĉeti novan biletan dum la vojo ekde la flughaveno al ILEI-kongresejo, precipe por unuafoja uzanto, precipe por alilanda gasto, kiu ne havas trafik-karton, ni **ne rekomendas** nun provi metroon.

Kiel atingi per metroo al ILEI-kongresejo

Deunggu
Deokdu

Flughaveno Gimhae

Seobusan Yutongjigu
Waebeop Renecite

Sasang

Gamjeon
Jurye
Naengjeong
Gaegeum
Donguei Univ.
Gaya
Buam
Beomnaegol
Beomil
Jwacheon
Buam
Seomyeon
Jeonpo
Busan Int' Finance Center, Busan Bank
Munhyeon
Jigegol
Motgol
Daeyeon
Kyung Sung Univ. Pukyong Nat'l Univ.
Namcheon
Geunmyeonsan
Gwangan
Suyeong
Millak
Centum City

Vi prenu la metroon en la flughavena stacio. Ĝia linio sur mapo estas purpura.

Vi atente elektu la direkton **al stacio 'Sasang'**. Post tri stacioj vi jam atingos la stacion 'Sasang'.

La stacio 'Sasang' estas finstacio por la purpura linio, kaj vi povas **ŝanĝi** al metroo **Linio 2a** (**verda** koloro), kiu kondukos vin al la ĉirkaŭaĵo de la kongresejo.

Se vi aĉetas unufojan bileton, vi devas aĉeti denove novan bileton en la stacio "Sasang". Se vi jam havas trafik-karton, vi ne bezonas fari tion.

Al la kongresejo plej proksima stacio estas stacio "BEXCO", la 26a stacio ekde la stacio "Sasang"

BEXCO (Busan Museum of Art)

Dongbaek
Haeundae

Kiel proksima estas de la metroo-stacio BEXCO la kongresejo ?



Stacio "BEXCO"

Uzu la elirejon n-ro. 3

Vi povas piede iri al la kongresejo.

Kie estas Limuzina buso kaj Taksio, en la flughaveno Gimhae



Por iri al bus-haltejoj kaj taksi-haltejo,
Eliru la terminalon kaj transiru la transpaŝejon.

Estas bus-haltejoj, inter kiuj la haltejo n-ro.2 estas por Limuzina Buso.
Ankoraŭ proksime de tie, vi vidos seriojn da taksioj.

La bildo montras, kiel aspektas antaŭ la internacia terminalo.
Tamen, saman formon havas ankaŭ la enlanda terminalo.



Atenton!

2 kursoj de Limuzina buso.

Ne konfuziĝu!

Vi devas elekti '**Al Haeundae**'.

(Ne al Seomyeon, Busan stacio)

Veturpago : KRW 7,000

Vi povas aĉeti bileton antaŭe aŭ pagi
kontante rekte al ŝoforo.

Vi uzas **limuzinan buson**, de flughaveno Gimhae al ILEI-Kongresejo

Bus-haltejoj de la Limuzina buso, ekde la flughaveno ĝis la kongresejo

0-Flughaveno Gimhae

- 1-Namcheon-Dong
- 2-Gwangan-Dong
- 3-Gwangan Subway Station (metroo-stacio)
- 4-Suyeong Jct. (kruciĝojo)
- 5-Suyeong Hyundai Apt.(apartamento)
- 6-Centum Hotel (hotelo)
- 7-Centum Home-Plus (magazeno) #7

8-Busan Sungmo Eye Hospital (hospitalo) #8

9-Gyeongnam Marina Apt. (apartamento) #9

- 10-Hotelo Park Hyatt Busan (hotelo) #10
- 11-Hanhwa Resort (kunsuvereneca loĝejo) #11
- 12-Hyundai Hyperion (apartamento) #12
- 13-The Westin Chosun Hotel (hotelo) #13
- 14-Grand Hotel (hotelo) #14
- 15-Haeundae Beach (mara strando) #15

Vi elbusiĝu ĉe la **8a haltejo** “Busan Sungmo Eye Hospital”.

Aŭ vi povas halti la **9an** “Gyeongnam Marina”,ke vi povos pli bone vidi la kongresejon ‘Arpina’ kaj ĝian najbaron “Suyeong-ro Preĝejo”



La kurso de la limuzina buso ĉirkaŭ Arpina (ILEI-Kongresejo)

Arpina kaj ĝia najbaro



Se vi haltos ĉe la **8a** haltejo “**Busan Sungmo Eye Hospital**”,
vi venos al kongresejo al malantaŭ de la kongresejo.
vi bezonas trapi intervojon de apartamento.

Se vi haltos ĉe la **9a** haltejo “**Gyeongnam Marina**”,
vi venos al la antaŭa flanko de la kongresejo kun maro malantaŭ via dorso.

Arpina estas facile trovebla, ĉar ĝia najbaro estas “Suyeong-ro preĝejo”
kun la kruco sur ĝia turo. Oni diras, ke ĝi estas plej granda en urbo Busan.

Aŭ vi povas halti la **9an** “Gyeongnam Marina”, ke vi povos pli bone vidi la
kongresejon ‘**Arpina**’ kaj ĝian najbaron “**Suyeong-ro Preĝejo**”

Taksio, de la flughaveno al la kongresejo

Veturprezo de Taksio

	Ordinara Taksio	Luksa Taksio (Nigra)
Baza prezo	₩ 2,800 por unua 2 km	₩ 5,000 por unua 3 km
Prezo laŭ distanco	₩ 100/143m ₩ 100/35 sek.	₩ 200/164m ₩ 200/39 sek.
	Se vi uzas taksion eksteren de la urba teritorio, 20% da ekstra prezo aldoniĝas.	Nenia ekstra pagigo.

Se vi uzas taksion al Arpina, ILEI-Kongresejo, via veturo estos

Tempodaŭro : ĉ. 60 min.

Veturpago :

ĉ. KRW 25,000 (Ordinara taksio)

ĉ. KRW 45,000 (Luksa taksio, nigra kolora)

Vi povas diri al ŝoforo

“Haeundae, Arpina”

aŭ montri lin la suban slipon, kaj li komprenos.

해운대 아르피나 유스호스텔

부산시 해운대구

우 2 동 해운대해변로 35

051) 731-9800